



Ĉiu privata esperantisto povas havi tiajn konvinkojn aŭ fari tiajn agojn, kiajn li volas, kaj ni ne respondas por liaj konvinkoj nek agoj, kiel li ne respondas por niaj. Li povas esti la plej granda egoisto, genta ŝovinisto, malamanto de homoj aŭ eĉ la plej malnobla krimulo, kaj se li nur uzas la lingvon Esperanto, ni ne povas malpermesi al li nomi sin esperantisto. Sed se li volas veni al esperantista kongreso, aŭ se li volas aliĝi al ia alia institucio, kiu portas la verdan standardon, tiam la afero ŝanĝiĝas. Tiam li venas en landon, kiu havas siajn apartajn leĝojn, siajn apartajn morojn kaj principojn.

Z, parolado en Kembriĝo 1907

Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Homa cerbo kaj esploroj de atentemo kaj memoro

Prelegos: Josef Vojáček

Mia partopreno en esplorprojekto de CEITEC en Brno-Bohunice.

Lingvo: La ĉeĥa

Kiam: la 12-an de aprilo 2022 je 18.00.

Kie: La renkontiĝo okazos rete per Skype

La ligilon mi sendos al vi marde.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.

Renkontiĝo estos registrata.



Ni rekomendas

- **JAM NUR UNU SEMAJNO!** Por ke ni bone regu nian lingvon, ni bezonas uzi ĝin. Unu eblo de uzo estas legado de esperanta literaturo. Bedaŭrinde pro sendokostoj homoj preskaŭ ne aĉetas alilandan E-literaturon. Nia klubo povas al vi peri aĉeton de libroj el **Bjalistoka e-butiko**. Pli da informoj vi trovos ĉe <https://butiko.esperantobrna.cz/content/8-nakup-zahranicni-esperantske-literatury>. Se vi ankoraŭ hezitas, ĉu aĉeti, ni citu Tomasz Chmielik: “Aĉetu verdajn librojn, eĉ se vi ne volas legi ĝin.” Sed prefere aĉetu kaj legu. Nur tial vi povas daŭrigi eldonadon de esperanta literaturo.

- Trapasu **KER ekzamenon** rete. Pli da informojn vi povas legi en Edukado.net ĉe <https://edukado.net/novajhoj?id=869>. Se vi interesiĝas pri la ekzameno, la ekzamkomisio petas vin, ke vi plenumu la enketilon ĉe <https://forms.gle/...4sagZvaeXoY9>. UEA agnoskas novajn retajn ekzamenojn.
- Ekde septembro Adam Mickiewicz Univiersitato en Poznano planas lanĉi novan tipon de studado. Temas pri du jara ĉeesta **magistra studado**, fako **Interlingvistiko** kadre de Lingvistiko kaj informmanaĝado. La studadoj estos en la angla kaj en Esperanto (ambaŭ lingvoj bezonataj). Por pli da informoj bonvolu kontakti prof. Ilona Koutny (ikoutny@amu.edu.pl)
- Vizitu **Arbaristan Panteonon**, belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĖDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice



Cetera programo en aprilo

La 19-an **Refleksivaj pronomoj** – Milan Kolka, ekzercoj. Občanský klub, Hybešova 65a

La 26-an **Konjugacio en la ĉeĥa kaj la supra soraba lingvoj** – Milan Kolka. Rete per Skajpo

Programo en majo

La 3-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita* . Občanský klub, Hybešova 65a

La 10-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita* . Rete per Skajpo

La 17-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Občanský klub, Hybešova 65a

La 24-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Rete per Skajpo

La 31-an **Historio de Ukrainio** – Oldřich Arnošt Fischer. Občanský klub, Hybešova 65a

Mi petas vin, ke vi proponu programon por resto de aprilo kaj por majo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvānek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLCloCHDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLCloCHDdrb9TaHggRM5cA>).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto

